

Numero: 266.
Julio: 2014.

22-a jarkolekto

Literaturaj Folioj

VESPERTO



Redaktanto:
Apáti Kovács Béla
Kaposvár
Béla király u. 44.
H-7400 HUNGARIO
Telefona: 82/ 410-664
Retadreso: espBELA@t-online.hu
Eldonanto: Kaposvara Esperanto Centro
Lingve kontrolis: Tuboly Erzsébet

Malutila lingvo



Ĉiu revadas pri facile kaj rapide ellernebla lingvo. Ellerni iun nacian lingvon estas longa kaj malfacila laboro. Tamen neniu pensas pri Esperanto serioze. En la okuloj de multaj homoj ĝi estas infanludilo. Kvazaŭ per ĝi oni ne povus komprenigi sin sur internacia tereno, kaj oni devus uzi iun mondlingvon, se ni deziras komuniki senĝene kun eksterlandanoj.

Esperanto jam pruvis plurfoje dum sia ekzisto, ke ĝi estas vivkapabla kaj uzebla por ĉiu celo.

Kial estas tiu ĉi malamikeco kontraŭ la zamenhofa lingvo? Tiu ĉi demando jam delonge interesas min, kaj mi serĉas la respondon.

Mi ne scias, ĉu mi ricevos iam kredeblan respondon aŭ tio ĉi restos por ĉiam sekreto.

Komence ĉio ŝajnis simpla. Mi esperis, ke ankoraŭ en mia vivo Esperanto fariĝos la unusola pontlingvo de la homaro kaj ĉiu akceptos ĝin. Baldaŭ mi devis vidi, ankaŭ Espranto havas malamikojn. Ofte mi trompiĝis en geamikoj, kiuj sciiĝante pri mia pasio priridis min aŭ ili frapetis mian ŝultron kaj diris patreco: "Kial vi ne lernas iun utilan lingvon? Nenie vi povas uzi tiun ĉi lingvon." Poste venis ankoraŭ multaj stultaj konsiloj. Ili ne aŭskultis miajn argumentojn. Vane mi provis konvinki ilin, ke Esperanto estas uzebla, bona lingvo, per ĝi oni povas komuniki en la tuta mondo. Ili ne kredis min. Ili nur ridis, eĉ ofte mi estis primokita.

Mi ne scias, kion fari poste? Ĉu indas por prediki ion al tiuj ĉi dubantoj? Ja, ankaŭ la faktojn ili ne kredas. Vane estas antaŭ iliaj okuloj la rezultoj, la miloj, eĉ dekmiloj da ekzemploj. Vane Esperanto travivis pli ol 125 sukcesajn jarojn. Se ĝi estus malutila kaj neuzebla lingvo, tiam jam antaŭ longe estus malaperinta en la maro de la lingvoj. En tiu ĉi maro ĉiujare pluraj lingvoj malaperas, sed Esperanto ankoraŭ ekzistas.

Espereble ankoraŭ longe ekzistos helpante la homaron en la ĉiutaga komunikado.

Laŭ mi urĝa tasko estas trovi solvon en nia kureganta mondo por komprenigi nin kun homoj parolantaj diversajn lingvojn.

Ofte mi malesperiĝas. Mi ne scias, kion fari? Kiel rilati al la dubantoj? Ĉu kiel amiko aŭ malamiko proksimiĝi al ili? Kiel mi povus servi nian aferon pli rezulte? Kiom da ekzemploj ankoraŭ ni devas montri, ke oni kredis nin kaj la zamenhofa lingvo estu akceptita.

-Redaktanto-

Silento

Profunda estis la silento. Jam ĝi estis neeltenebla. Li ŝatis la silenton, sed tamen nun jam ankaŭ por li ĝi estis terura. Ĝi traboris lian tutan kapon kaj li sentis, se ĝi longe daŭros, tiam lia menso estos reversita kaj ĉesos la mondo.

Li deziris iom da homa parolo, kiu nun karesadus lin. Li ne sentus la solecon kaj tiun ĉi profundan, dolorigan silenton.

Li ekprovis citi kelke da homaj vortoj. Kiam du homoj parolas unu kun la alia.

Ne sukcesis. La silento subpremis ĉion kaj ĝi premis ĝian animon. Li sentis, tio ĉi murdos ĝin baldaŭe. Ĝi sirmordadas lin de piedo ĝis kapo.

Li deziris aŭdi parolon, bruon. Ne gravas kian bruon, ĝi nur eĥu en lia kapo kaj li povus liberiĝi de la sientio.

Li ne povis krei. Voĉo ne forlasis lian buŝon. Li nur movadis siajn lipojn, sed li restis muta.

Kio okazis? Li ne komprenis. Ĉu li surdiĝis kaj mutiĝis?

Li komencis preĝi al Dio. Sed eble ankaŭ Dio ne komprenas sian petegon.

Liberiĝi kaj liberiĝi el tiu ĉi malĝoja situacio. Vana provado.

Malrapide ĉio komencis malheliĝi ĉirkaŭ li kaj li falis kaj falis en profundegan abismon.

Malsupre estis multegaj homoj, kiuj same kiel li mortis pro la silento. Ankaŭ lin atendas simila morto. Li ne povis komprenigi sin kun la mondo.

Ŝaŝa



Aventuroj sur Luno

-Verkis: Apáti Kovács Béla-

Jaro 3014. La najbara planedo de Tero jam estas loĝata depost jarcentoj. La unuaj koloniistoj alvenis antaŭ jarcentoj. Baldaŭ ĉie ekaperis lunurboj. Komence estis grava problemo la aero sur la surfaco. La unuaj koloniistoj devis vivi en specialaj vitrokupoloj. Sed ili rapide difektiĝis ofte kaŭzante katastrofojn. La tie vivantaj homoj mortis aŭ malsaniĝis.

Urĝe oni devis solvi ĉi tiun problemon, por ke Luno estu la dua hejmo de la homaro. Post kelkjardecaj esploroj kaj pena laboro la sciencistoj konstruis gigantajn aerofarantajn aparatojn, kiuj estis estigitaj preskaŭ sur la tuta Luno kaj nun jam escepte kelkajn teritoriojn la aero ĉie sama, kiel sur Tero kaj la lunloĝantoj povas movi sen skafandero. Baldaŭe malaperis la vitrokupoloj kaj nun jam tie estas samaj teraj konstruaĵoj. Ĉiutagaj estis kosmaj veturadoj inter Tero kaj Luno. Lunde kaj jaŭde ekveturis kosmaj trajnoj tien kaj reen.

Ankaŭ la sekva evento okazis en tia kosma trajno. Nia heroo Johano Diamanto ekiris por ferii al sia onklino Izabela, kiu estis la posedanto de luksa hotelo. La oldulino invitis lin. Ili jam ne vidis unu la alian delonge. Johano ankoraŭ estis infano, kiam Izabela translokiĝis al Luno. Li apenaŭ rememoris pri ŝi. Tiam ankoraŭ ŝi estis svelta, blondharara junulino.

Certe jam ankaŭ ŝi fariĝis pli maljuna. Sed Dio scias, ĉu oni maljuniĝas sur Luno. Eble tie alie pasas la tempo.

Li ekscitite atendis la renkontiĝon. Ĉu ili rekonos unu la alian? Lia koro rapide pulsadis, se li pensis tiu ĉi momento.

Neniu legis jam paperlibron. Estis strange, se iu prenis tian libron en la mano, tiam oni mire rigardas lin.

Johano ne ŝatis la modernajn elektronikajn librojn. Ne nur la tekniko ĝenis lin, sed ankaŭ la enhavo de tiaj libroj. Li prefere foliumis la malnovajn ledobinditajn librojn. Ankaŭ nun li legis tian libron ricevinte de sia avo. Iu el la personaro de la kosmoŝipo rimarkis iom ironie:

-Ĉu ankoraŭ ekzistas pralibro?

Li lasis la demandantojn senresponde kaj li legis plu.

Nerimarkite junulino sidiĝis al la malgranda, rondforma tablo. Ŝi diris nenion. Mute ŝi sidis kaj unutone rigardis la lustron super ili. Ĝi estis luksa, kiel en eleganta salono.

Baldaŭ la kelnero ĝentile demandis de ŝi

-Per kio mi povas servi al vi, fraŭlino? Viskion, iun koktelon?

-Dankegon – ŝi respondis ridetante – Mi petas nur glaseton da minerala akvo.

Je tio ankaŭ Johano eklevis sian kapon kaj lin tuj pikis la belegaj, bluaj okuloj de la virino. La libro preskaŭ elfalis el liaj manoj.

Kiam la kelnero foriris, iliaj okuloj renkontiĝis. Ili ambaŭ ekridetis. Ili longe rigardis unu la alian. Fine Johano elbuŝigis:

-Salut'!

-Salut'! – respondis tute trankvile la junulino, kvazaŭ jam depost jardekoj Johano estus konata. – Mia nomo estas Elizabeto Rozo.

-Johano Diamanto – li tendis sian brakon al la direkto de la virino.

La tuŝo de ŝia manplato estis velura kaj iom malvarmeta. Kiam la manoj renkontiĝis, kvazaŭ kurento ekskuintus lian tutan korpon.

Tiam ankoraŭ ne sciis, ĉu tiu ĉi renkonto estos longa aŭ nur unufoja. post la alveno ili neniam revidos unu la alian.

Elizabeto denove ekparolis:

-Kiun libron vi legas? Ŝajnas al mi ĝi ne ĉiutaga legaĵo. Ĉu ne?

-Homero: Odiseado.


-Ĉu? Ĉu vin interesas la antikva literaturo? Mia patro estis la profesoro de la tutmonda literaturo. Ankaŭ li ofte legadis Homeron. Mi konfesas al vi, mi apenaŭ scias pri li ion. Min interesas la nuntempa, moderna literaturo. Homero estas de ni tempe tre malproksime. Ne forgesu, ni vivas en la jaro 3014. En lia epoko ankoraŭ oni veturadis per ŝipo sur la maroj Al ili la ĉieloj estis ne atigeblaj.

-Mi ne konsentas. Laŭ mi anime kaj image ili traveturadis la tutan universon. Ili pli bone konis la planedojn ol ni.

Elizabeton surprizis la respondo. Ŝi ne sciis, kion respondi. Ŝi kaŝiĝis malantaŭ ĉarma rideto. Ŝi metis kruce siajn piedojn kaj ŝiaj formaj femuroj vekis la atenton de Johano. Eble tion ĉi ankaŭ ŝi rimarkis, sed ŝajne tio ne ĝenis ŝin, eĉ ŝi fariĝis pli koketa.

Post kelkaj sekundoj ili ambaŭ ekridis kaj la virino trinkis guton da minerala akvo. Johano ĉesis la babiladon kaj klopodis legi plu, sed jam tio ne sukcesis, kiel antaŭe, ĉar en ĉiu momento li devis ĵeti rigardon al la belegaj femuroj de Elizabeto.

(-Daŭrigota-)



Poezio

*Al s-ano L.L. Zamenhof, Edeno, 7-a ĉielo
de L. de Beaufront, Infero, kaldrono n-ro 3*

Sinjoro Ludoviko kaj Lazaro
Forestas inter ni iama blag'.
Delonge trankviliĝis la bazaro
De lingvoj niaj.
Malhelpis nia skismo al la iro,
Ni vane perdis tempon en pugnad'.
Mi devas nun konfesi, kiel kavaliro,
Pri pekoj miaj.

Mi idon mian puŝis energie,
Elspezojn ne kalkulis por l' afer'.
Kaj multaj uloj tiam min subtenis krie
Ĝis lasta kver'.

En mia koro restis la cikatro...
Jes, mi pri ĉio certe kulpas mem!
Konsentu tamen, kara, ke mia vorto "matro"
Pli taŭgas por blasfem'.

Tre baldaŭ en aplaŭdoj jubileaj
Vin gloros la moderna junular'.
Vi spektos, kiel marŝas agoj viaj kreaj
En la popolon.
Sed mi ĉi tie koldas en kaldrono,
Lignaĵo iĝis deficitita var'...
Ĉu povas vi aranĝi por eksamikoj bona
Normalan bolon?

Kverelojn kovris polvo de l' jarcento,
Galopas via lingvo al progres'.
Eĉ en la oriento prosperas nova sento...
Tamen jes!

Sed ridas oni nur pri l' ploro mia,
Parolas volapuke ĉe l' kaldron'!
Atendas la respondon, restas ĉiam via –
Leo de Beaufront.

Al L. de Beaufront, ie en Infero

Aĥ, kara mia Ljova de Bofruno, –
Letero via venis – jen surpriz'!
Imagu: mi enuas eĉ pli ol vi en nuna
Senzorge putriĝanta paradiz'.
Por kia matro skribas vi pri "matro"?
– Cent jaroj pasis – samas la naiv'...
Vi diru ne "onklino", sed "ondatro" –
Ne tio ja plej gravas en la viv'.

Nu, mi konsentas, kara de Bofruno,
Ke lamas al progreso mia plant';
En la patruj'-Rusio jam mankas eble punkto,
En kiu ne iamus Esperant'.
Jam mia kor' ne batas maltrankvile,

El mia brusto ne plu saltas for,
Sed volus mi sur Ter' aperi pluvsimile,
Enspiri mian emon al labor'.

Kaj vi ankoraŭ skribas, kara Ljova,
Pri marŝo jubilea kaj pri l' fam' –
Ve, en jubileado jam nenio estas nova,
Ĉar eĉ SEJM-anoj jubileas jam.
Aĥ, ci, naiva mia de Bofruno,
En la kaldron' komprenu vi en fin':
Ne endas fidi nun al la moderna juno,
Samkiel ili ne tro kredas nin.

Adeptoj niaj, rektaj kaj kuraĝaj,
Irantaj flanken for de nia cel',
Diskutas arde en kostumoj plaĝaj,
Ĉu sendos nun manaon la ĉiel'.
Nur scienculoj, prudaj kaj neprudaj,
Pri la problem' parolas nun kun ŝat', –
El longaj, longaj interlingvistikaj studoj
La neston modlas ĉiu kandidat'.

Torturas homojn la verkema bolo:
Poemo kaj kritik' aperas tuj.
Literaturas oni, tamen, en "Skatolo",
Ĉar mankas dume pli ampleksa uĵ'.
Kaj ĉiu nova vort', kiel almozo,
Ŝteliras preter malmalula front', –
Problemojn ĉiujn solvos nur la regulo Zozo,
Invent' utila por moderna mond'.

Aĥ, tera viv' – afer' neserioza!
Sed tie ĉi mi trovis dum promen'
Sur la nubeto ŝildon – "Loko por Berjoza" –
Ĉu mi post tio restu en Eden'?!
Forgesu pri iamaj superstiĉoj,
Karulo mia, Ljova de Bofron'!
Mi kredas ja, ke nepre estos ni feliĉaj
Nur kune eksidonte en kaldron'.

Mikaelo Bronŝtejn



Por infanoj

Viro kaj Leporo



En iu belega somera posttagmeza tago la malgranda leporeto irante hejmen ekvidis kampanaron, kiu diligente laboris sur sia bieneto.

Ĝi iris al la homo kaj demandis de li:

-Kion vi faras?

-Mi plantas karoton – respondis la viro, sed dume li laboris, ĉar sur la ĉielo grandaj, nigraj nuboj kolektiĝis. Antaŭ la pluvego li deziris fini la laboron.

-Kio estas la karoto? – demandis plu la leporo. – Mi ankoraŭ ne vidis ĝin.

La viro ne emis longe babili. La laboro estis tre urĝa kaj pensante, se li petos helpon la eta besto ektimas kaj ĝi forkurois.

-Se vi helpas al mi en la laboro, tiam mi malkaŝos al vi, eĉ vi povos gustumi ĝin.

La leporo ne manĝis dum la tuta tago, kaj ege malsatiĝis. Volonte ĝi akceptis la proponon de la viro.

-Mi volonte helpas. Kion fari? Montru al mi, kiel planti la karoton.

La viron surprizis la helpemo, kaj vole nevole instruis al sia novbakita helpanto, kiu rapide ellernis la farandaĵojn, kaj tiel antaŭ la tempesto ili finis la laboron.

-Ĉu nun mi povas gustumi la karoton? – demandis scivole la leporo.

La viro komencis ridegi:

-Vi estas stultulo. Ĉu vi pensis, ke tuj elkreskos el la tero la karoto?

-Jes. Ja vi diris tion.

-Oni devas atendi semajnojn ĝis el la malgrandaj semoj estos bela, ruĝa karoto. Revenu post kvin semajnoj, kaj tiam vi povos gustumi la karoton – ruzadis la viro kaj dume li pensis, ke la leporo forgesos la inviton.


Ili disiĝis kaj ekiris hejmen. La grandorelulo estis trompiĝanta, sed hejme skribis en la kalendaron la daton de la randevuo post kvin semajnoj.

Malfacile pasis la tagoj kaj semajnoj, sed fine alvenis la tre atendita dato.

La leporo ekscitite iris al la karotobieno. Dum la tuta vojo ĝi revadis kiom multe manĝos el la karoto, kion ĝi plantis.

Ankaŭ la viro estis tie, sed ne sola. Kun li estis siaj kelkaj amikoj kaj en ilia mano estis pafilo. Ĝi bone konis tiun ĉi armilon. Iam preskaŭ ĝi faris truon sur ĝian peltaĵon. Se ĝi ne povus rapide kuregi, tiam jam delonge ĝi estus mortinta. Ankaŭ nun ĝi preferis forkuris sen karoto.

Tiu ĉi aĉa konduto de la viro tre, tre malgajigis ĝin. Ĝi ne pensis, ke li estos tiom malhonesta. Ĝi helpis al li kaj antaŭ la granda tempesto ili sukcese plantis ĉiun karotosemon, kaj nun ĝi petus nur unusolan karoton por gustumi ĝin. Anstataŭ tio li atendis ĝin kun pafiloj.



Ĝi decidis, ke venĝos la viron. Komence ĝi ne sciis kiel. Preskaŭ ĉiutage la karotobieno estis gardata.

La leporo kaŝiĝis en la proksima arbusto kaj de tie ĝi atentis. Ĝi esperis, ke finfine alvenos la taŭga momento, kaj tiam ĝi povos venĝi la viron.

Longe ĝi atendis en la arbusto. Post la abunda tagmanĝo kaj eltrinko de la botelo da vino la gardanto ekdormis, sed tiom, ke oni ne povintus veki line eĉ per mil kanonopafo.

Ĝi estis bonega okazo por la venĝado. Ĝi kunportis grandan sakon kaj elfosis la tutan karoton el la tero. Eĉ unu peceton ĝi ne lasis por la viro.

Kiam la granda sako pleniĝis la leporo portis ĝin hejmen. Ĝi apenaŭ atendis, ke ĝi povu gustumi ĝin.

Ankoraŭ neniam manĝis tiel bongustan manĝaĵon. Ĝi tuj decidis, en la estonto ĉiam ĝi dekonajumos la karotobienon de la viro.

Eble se li ne estus avara, tiam la leporo ankaŭ alifoje estus helpinta al li por planti karoton.

-Onklo Adalbero-



Birdoj

Birdoj



Paruo



Cikonioj



Papagoj



Pigo



Strigo



Aglo



Hirundo



Pego